# La prizonoj de la menso[1]

1. Ĉi tiu titolo estas elektita memore al kanada filmo de Pierre Lasrj, Prisons de l'esprit (Captive Minds: Hjpnosis and Bejond), 1984, l6mm, 55 min. Ĉi tiu artikolo estas prezentata en ĉi tiu interretejo kun la afabla permeso de sia aŭtoro HENRI BROCH kaj la konsento de la revuo AGONE kiu eldonis ĝin en sia numero 23: 109-129 (2000)

**UNUAN DE JANUARO 2000, FRANCE 2,** televida nokta ĵurnalo: la plej malnobliga intelekta malpuraĵo etendiĝas sur la ekrano de la ŝtata ĉeno kie la prezentistino pridemandas kaj aŭskultas gapante, dum longaj momentoj... medium-aŭguristinon balbutante pri la internacia politiko, la milito en Ĉeĉenio, la kataklismoj, la meteorologio aŭ la ekonomio !
Jen informa ĵurnalo kiu aŭguras bone por la venonta jaro. Sed lasu ni iom malpliiĝi nian pravan koleron.
La demando prezentiĝas tiel: kio puŝas iun al elkraĉaĵoj kaj/aŭ glutado de tiaj stultaĵoj ?
Ĉu la ĵurnalista medio kapablas vere doni informon ?
Ni lasu nian koleron malaltiĝi unugrade .
Kiuj estas la " kialoj " kiuj instigas iun al kredi ? kaj en kio ? aŭ, formulite alimaniere, kiuj estas la kaŭzoj soci-psikologiaj de la kredo, de la kredoj ? Ĉu oni necese apartigu la kredon " religiecan " de la " popolaj mitoj kaj legendoj " laŭ la ies klamo ?
Ĉu estus kredoj, kultoj sav-sciencaj aŭ ne, bonefikaj kaj kredoj malbonaj ?
Kredoj kiuj konsistigas spiritan plialtiĝon de l'animo kaj kredoj kiuj konsistigas malsupreniron ( al infero ?) kaj malnobligas la homo je la besta grado ?

Malgraŭ ke multjarcenta rekta vendologio povas kredigi al malsimileco de ĉi tiuj diversaj kredotipoj, estas nenegebla punkto komuna : la forlaso de la racio. La tuta cetero estas afero de enpakigo kaj de manipulado de la vera historio de la homoj.

#### KIAL KREDI ?

Unuatempe, limigu nin je la moŝta singularo, je la kredo.
La kredo estas ofte tute simple la konsekvenco de procezo de societemiĝo. Kialo evidenta sed ofte forgesita, la tre granda plimulto de la personoj estas akceptintaj " aŭtomate " la religion de siaj gepatroj. La infano enigas al si la superstarantajn elementojn de sia ĉirkaŭanta kulturo el kio la religio estas parto. Enketoj usonaj tiel montris ke la plej bona parametro por aŭguri ĉu infano estas akceptonta aŭ ne la religiajn kredojn de siaj gepatroj estas la " forto " kun kio ĉi tiuj kredoj estas afiŝataj en la familia hejmo.La pludaŭrado de la religio (kvankam malfortigita) estas do tute simple la fakto ke la nombro de religiaj gepatroj estas je la nuna horo tre larĝe supera al ĉi tiuj de la nereligiaj.Sed kion povas alporti la religio kiu fortigas la personojn " post kiam la gepatra spuro estas stompita " en iliaj elektoj "? La religio provizas rekompensojn[2]Kompreneble ne ununuraj propraĵoj de la religio sed kiujn ĉi tiu havas la avantaĵon prezenti samtempe kiuj estas tiom da risortoj.

2 Bruce Hunsberger " Social-psychological causes of faith ", Free Inquiry, vol 19 n°3,été 1999, p. 34-37.

#### SENSO DE (EN) LA VIVO

Multaj personoj estas serĉantaj " senson " kiun ili antaŭsupozas ( forgesante ke la " fincelo " de la universo, supozata tradukanta la ekziston de supera ento, estas neniel esenca propraĵo de ĉi tiu universo sed tute simple kreaĵo de nia menso). Ili pensas trovi ĉi tiun senson en la religio ĉar ĉi tiu lasta prezentas sin kiel donacanta klarigojn de la mondo kaj de la universo. Sendepende de la fakto ke la alportita respondo estas korekta aŭ ne, la simpla fakto havi " aŭ pensi havi " respondon " permesas maltimigi sin.

#### (RE)FORTIGO/KONFORTO

Kiam nereligiaj personoj unuavide turniĝas al la religio, ili tion faras plej ofte pro kialoj psikologiaj kaj emociaj. Fronte al problemoj renkontitaj ( malapero de amataj estaĵoj, familiaj misfunkciadoj, krimaj sintenoj, drogoj, ktp...), la religio donacas al ili refortigon, do la eblecon vivi " feliĉe " kion ili ne estis trovintaj en sia vivo. Notu ni preterpasante ke ĉi tiuj kiuj, male, forlasas religion faras tion pro intelektaj kialoj. Temas ofte pri malkonstruo de la konstruaĵo mem kaj de la fundamentoj sur kiuj estas " bazita " religio kiu igas ilin al malebleco de kredo al la religio kiun oni estis instruinta ( encerbigis ? )al ili. Se ĉi tiu malkonstruado estas sistema, ĉi tiuj personoj turnas sin ofte al la scienco kiel helpo al streko de sia vivo.

#### BUFRO/ SOCIA APOGILO

Trans la individua nivelo, la religio agas por multaj personoj, kiel sorto de bufro kontraŭ la angoroj, la streĉo, la malsano, la morto de la proksimuloj, ktp... L'aparteno al " strukturo " religia permesas trovi konkretan helpon por alfronti " are " problemojn de la vivo ( sen ke ĉi tio implicas iel ajn ke la religiaj grupoj estas pli " lutitaj " ol aliaj grupoj).

#### STATUTO

L'akceptado, la enestiĝo, en religia komunumo prezentas la suplementan oportunaĵon donaci statuton, se ne prestiĝon. L' akceptito, la malprofanigita, sentas sin, scias sin, supera je la cetera plena komunumo en kio lia religia komunumo estas subaro (sed kiun l'akceptito sensas aŭ lokigas kiel " sur " -aro, elestaĵo, selektitaĵo).

### PRAVIGO

Puŝita al ekstremaj pozicioj, la religio povas same provizi pravigon, alibion, al ies " aŭtoritemaj " agmanieroj. Diversaj studoj pri ĉi tiu temo efektive montris ke la religia fundamentismo forte ligiĝas kun raciistaj sintenoj kaj agmanieroj (kaj/aŭ seksistaj).

Resume, la psikolgia lambastono kiu estas la kredo ŝajnas alporti al la individuo pli da " profitoj " ol da " kostoj " kaj mi ne certas ke l'ateismo povas proponi tiom. Sciante ke male la ideoj disdonataj de la informrimedaro nune religia irado kaj irado scienca estas neakordigeblaj[3], kaj ke nur scienca alproksimiĝo " netriviala kaj nececesiganta realan lernado " povas doni al ni objektivajn konaĵojn, kiu povus tiam arogi al si la rajton fortiri ĉi tiun lambastonon se li ne povas donaci la senhelpbezonan marŝon al ĉi tiu individuo ?

Vivi sen la " profitoj " asociataj al religio necesigas personecon fortan kaj sendependan.

Tio kion ni povas " devas " fari estas do alporti informon kiu plej ofte mankas pri ĉiuj subjektoj kaj temoj rilate al kredoj kaj religioj. Kaj kiam oni parolas pri " religioj ", necesas pensi en larĝa spektro ĉar ci tio koncernas ankaŭ la flordonantaj " para-religioj ".

3. Vidu (en la franca) Jean Bricmont, " Science et religion l'irréductible antagonisme ", infra, p. 131-151.

#### KION (EN KIO) KREDI ?

Necesas atentigi pri la fakto ke kredi povas esti...tute ĝustigata. Kondiĉe klare distingi kredi ion el kredi en io[4].

Biologisto lasttempe rememorigis ke se oni starigas la demandon " ĉu vi kredas en la evolucio? ", la problemo estas iom falsigita[5]. Efektive, la sciencistoj ne kredas en la evolucio, ili " kredas l'evolucion ". Tio kio ne samas. Trans la semantikon, estas ĉi tie reala malsameco inter la du iradoj kiujn implicas la du formuladoj.

La sciencistoj kredas l'evolucion ĉar multaj objektivaj donitaĵoj ĝin subtenas kaj ili kredos l'evolucion ĝis kiam nova aro da donitaĵoj montros alian ion. Dum" kredi en l'evolucio " implicas la kredon, same kiel kredi al feinoj aŭ, evidente ĉi tie, " kredi en la kreado " ( por pravigi sian alproksimiĝon, la kreadistoj strebas al igi..., kredi ke la sciencistoj akceptas la teorion de l'evoluo laŭ la maniero " kredi en ", tio estas kiel kredokonfeso ). Tion dirinte, en kio oni kredas? La studkampo estas vasta el la simplaj kredoj aŭ trosimplecaj ĝis la kredoj kiuj eliras vere el la normoj, de la ordinaro. Kaj ne temas ĉi tie fari nur supraĵan prezentadon. Fakte, eĉ kredo ekterordinara ne bezonas eksterordinaran kaŭzon.

Ĉia kredo nepre dependas de la fenomenoj kiuj ĝin kreis. La kredo en Zeŭso ĵetisto de la fulmo, la famekonata ĉiela fasko el zigzagaj sagoj, ŝajnas dependi tamen iomete de la fakto ke la fulmo " falas " de tempaltempe sur la realan kaj konkretan bienon de la malfeliĉaj teranoj kiujn ni estas...

4. Ĉi tie oni retrovas la problemon de la elekto de la vortoj kiun mi jam elvokis ekzemple (franclingve) en Le Paranormal, coll. " Science ouverte ", Seuil, 1985 (1997).

5. Barry Patevitch, " Science and the Versus of religion ", Skeptical Inquirer, vol. 23, n°4, juillet-août 1999, p. 32-36

La mito ne imagas la kaŭzon de la konataj fenomenoj kiel iuj povis tion diri; Fakte, la mito imagas la kaŭzon de la fenomenoj observataj sed evidente ne konataj alie ĝia neceso estus nula. Se oni volas ĉi tie formeti la filozofian uzon de la mito ( oni parolas ĉi tie pri populara mito kaj ne pri " rakonto-mito "filozofa ), mi pensas ke la situacio estas tiel resumebla " La rito venas antaŭ la mito ". La fenomeno okazas, reokazas, la supersticia konduto instaliĝas kaj ekigaskredon, " la elektito " strukturas la miton, kompletigas la kredon, finpretigas ĝin, igas ĝin prezenteblan, eksporteblan. la surtronigado de novaj pastroj pludaŭrigas ĝin. La ekaj ritaj kutimoj povas poste malrapide ŝanĝiĝi pro la interna ago de la malsimpliĝo de la mito aŭ pro la eksterna ago de diversaj sociaj trudadoj aŭ transdoniĝas senŝanĝe al alia religio kiu sorbos ilin " sinkretismo devigas " evoluigante sian propran miton. "Kiu ne manĝos mian korpon kaj ne trinkos mian sangon tiel ke li miksos sin al mi kaj ke mi miksos min al li, ĉi tiu restos sen savo." Jesuo ?... Ne , Zoroastro, 600 jarojn antaŭe...

"Ĉi tiu kiu ne manĝos mian korpon kaj ne trinkos mian sangon tiel ke li fandiĝos kun mi kaj mi kun li ne havos savon." Ha, ĉi foje Jesuo ?... Ne, Mitrao kaj ĉiam multe antaŭe[6]

En vero, en vero mi tion asertas, plagiatisto estas Jesuo Kristo.

La plej bela ekzemplo de kredo larĝe disetendita estas eble ĉi tiu de la simpla tera ekzisto de la estaĵo kiu, enkarnigas (la vorto estas ĝusta) la diaĵon : Jesuo Kristo. Multaj (sed ne ankoraŭ sufiĉe ! ) fakuloj kiuj laboris kaj laboras sur la temo alvenas al la konkludo ke la primitiva kristanismo estis doseta ( kaj tio ĝis ĉirkaŭ 144, dato de la ekskomuniko de Marciono kies evangilo prezentis ĉielan Kriston ). Kaj fine ne estas minimumaj petotaj pruvoj favore je la ekzisto de Jesuo " la laboroj faritaj de unu jarcentoreduktis la historiecon al simpla kredakto, mensa kutimo, oportunista sinteno "[7]. Tio kio eĉ  eklesianoj konfesis de longe: " Ha ! Kiom ni estas pliriĉigitaj de ĉi tiu fablo de Kristo " , Leono X...papo de 1513 ĝis 1521[8].

6. Guy Fau, Le Christianisme sans Jésus, auto-édité, 1995 (Guy Fau, av. de la Gare, 07220 Viviers). Vidu same La Fable de Jésus, éd. Rationalistes, 1967.
7. Jean-Kléber Watson, Le Christianisme avant Jésus-Christ, auto-édité, 1988 (ouvrage en souscription Henri Labbé, 19 avenue Jeanne-d'Arc, 24000 Périgueux).
8. Jean Meslier, Mémoire des pensées et des sentiments de Jean Meslier, prêtre curé d'Etrépigny et de Balaives (1664-1729), Cou. " Lumières de tous les temps ",éd. Rationalistes, 1973.

La kredo necesigas ( aŭ implicas ?) la ekziston, kaj por aserti ĉi tiun ekziston oni eltiru el la subtegmentejoj la

relikvojn por subteni la ŝancelantan kredon. Kaj certe ne la " Sankta Mortintuko de Torino " kiun oni reelstarigas per falsaj argumentoj, ne povos pruvi ion ajn.

Estas pruvita jam de kelktempe ke ĉi tiu tuko estas pura produkto "made in France" dum la XIVa jarcento[9]. Male eĉ je la malveroj kiujn la informrimedoj martelumigas al ni ( kaj kiujn ni prisuferos pligrandskale ankoraŭ dum la " Jubileo 2000 "), la verŝajna fabrikotekniko infane simplas. Mi mem, same kiel pluraj el miaj studantoj en zetetiko, fabrikis " mortintukojn " per samepokaj produktaĵoj kaj la rezulto prezentas ĉiajn ecojn de la tuko de Torino. Ne eblas vi diros al mi, ke oni sukcesus kredigi al tera Jesuo se tio ne estus realo mito ne estas devigebla, ne tiom facile, ne tiom larĝe tamen. Ne tiom certe. Ne nur mito estas fabrikebla sed mito povas trudi sin. Kaj ne necesas esti malproksime je pluraj jarcentoj el la epoko de la centra rolanto (kiam lia ekzisto realas)por sukcesi ĉi tiun vendologian operacion. ĉi tio povas esti fabrikata dum la vivo de la rolanto. la ekzemplon donas la mito la plej ĵusa: ĉi tiu de la patrino Teresa. Dum ke ĉi tiu virino mortis en 1997 kun aŭreolo jam elplektita, promociis teologion de la sklavigo kiu ne malpliigas la malfeliĉon de la mizeruloj sed malpezigas la konsciencon de la riĉuloj, ŝi estas prezentata de la informrimedoj kiel sanktulino " kiun ŝi ne malfrue iĝos, la paptempo de Johano-Paŭlo II elstariĝante pro nesatigebleco debeatigoj kaj kanonizadoj[10]. "

9.Henri Broch, Le Paranormal, op. cit.
10.Déjà plus de 600 béatifications et 300 canonisations ! alors que pour les quatre siècles précédents, le Vatican a canonisé 679 personnes...

Ĵurnalisto enketis, kaj la rezulto instruantas. Ĝi montras ke " patrino Teresa, unu el la maloftaj netuŝeblaj en la mensa universo de la naivuloj kaj de la mezvaloruloj " ekspluatis la merkaton de la espero kvankam la plej simplaj normalaj flegoj ne estis efektivigitaj. Ne temis fakte malaltigi dolorojn de la mortantoj sed "promocii kulton fundita sur la morto, la sufero kaj la submetiĝo "[11].

Mi ankoraŭ memoras tion kion diris al mi enBombaj, dum januaro 1978, india laboristo kun kiu mi sukcesis ekligiĝi. Kun kolero nur okulvidebla, li klarigis al mi ke "la plej grava plago de Indio, estas patrino Tere$a. " Ĉi tiu lando havis tempon por juĝi laŭ provaĵoj... Estas multe pli da sindonemo, multe pli da homaremeco, ĉe junulo 17 jara kiu iĝas volonta fajrobrigadano kaj donacas kompletajn noktojn por helpon alporti al sia samulo akcidentita, inundata, atakita kaj minacata de la flamoj ol ĉe virino kiu proponas kiel nuran helpon malrapidan forpasadon, troigitan suferon kaj " bileton por la ĉielo " kvankam ekzistas kuraciloj " iuj simplegaj " por trakti la malsanojn kiuj suferigas la personojn de ŝi "prizorgitaj " kaj ke ĉi tiu informrimedumata sanktulino posedas ĉiujn la dolardojn necesajn por ilin provizi. Por fini la ĉapitron pri "Patrino" Tere$a[12], la 25an de decembro 1999, grandega novaĵo estas dissendita: opinisondo montris ke ĉi tiu religiulino estas rigardata de la Francoj kiel..." la humanistino de la jarcento ". Jen kio estas timiganta.

11.Christopher Hitchens, Le Mythe de mère Teresa, Dagomo, 1996.
12.Jen la preciza skribo kiun mi adoptis ĉar, se ĉi tiu virino ignoris tion kion patrineco signifas, ŝi bone konis kion dolardo valoras.

**SCIENCO/FAKTOY & RELIGIO/MORALO ?**

La scienco parolas por la faktoj, la religio parolas por la moralo, tion oni kutimas aŭdi. Sed okulfrapas ke la kredantoj ne monopoligas ĉi tiun lastan kaj ke la religio ne estas nure rajtigita " se ĝi tia estas ! " por paroli pri moralo. Kiom cetere valoras ĝian " sperteco " sur ĉi tiu kampo ?

" Mortigu ilin ĉiuj, Dio rekonos la siajn " ne ŝajnas posedi econ aparte moralan... La Albigensoj, tio datumas de sufiĉe longe, vi diros al mi. Nu . Sed kion diri pri " La nenormala infano [post la " incidento " de Seveso kaj la problemo por la gravidaj virinoj najbaraj en la regiono trafita de la dioksino, sciante ke la aborto en

Italio ne estas pape laŭmoda] estas la kruco kiun ĉi tiuj junaj virinoj estas portontoj same kiel Jesuo portis la sian ". Sen komente.

Sammaniere aserti, ke la religio ne limuzurpas sur la sciencan kampon tute falsas. La zoologisto Riĉard Dawkins evidentigis tion[13]. La nasko de la Virgulino, ŝia asompcio ( mirakla liftado kaj korpa ĉeesto de la Virgulino en la ĉielo post ŝia morto, dogmo kreita en 1950 de Pie XII ), la resurekto de Jesuo, k.t.p. estas asertoj klare ece sciencaj, tio estas kiuj apartenas je la kampo de la scienca enketado. Se Jesuo havas pratron el karno kaj ostoj aŭ ne estas problemo de moralo aŭ de " valoro ", estas simpla afero de konkretaj faktoj, konstatitaj aŭ ne. Eĉ se oni ne havas materion por respondi nune, ĉi tio restas afero kiu apartenas al la scienca kampo, ne al ia " kampo de moralaj valoroj ".

Tio situas je la nivelo de la simboloj diros oni al ni. Vi ne povas, vi ne devas " enketi " sur ĉi tiuj subjektoj. Tamen, tio kio donas forton al ĉi tiuj deklaroj kaj kiu permesas prozelitismon fari, estas ĝuste ke ĉi tiuj deklaroj, malproksime de la simboloj, arogas al si povon apartenantan al la scienca kampo. Ili fakte referencas al povo opoziciante sin al la leĝoj de la naturo, supera do intencece al ĉi tiuj lastaj pro tio ili lokiĝas en la scienca kampo .

Jen kio forlasigas nin la singularon de moŝteco kaj kondukas nin rekte " sen ia interrompado " al la kredoj en iliaj pluraleco, al la speŭdaj kaj parasciencoj[14].

13. Richard Dawkins, " You can't have it both ways irreconciliable differences? ", Skeptical Inquirer, vol. 23, n$^{o}$4, juillet-août 1999, p. 62-64.
14. Henri Broch, " Science, pseudo-sciences et zététique ", Dictionnaire encyclopédique Quillet Actuel, 1994, p. 184-190..

Se la " racieco " lokiĝas evidente kaj unuavide eminenta en la taksado de niaj kredoj kaj en iliaj malkonstruado, ŝajneblus provokema pridemandi al si " Ĉu la racieco lokiĝas en la konstruado de niaj kredoj ? ".

Ne la lerna nivelo de iu difinas ties kredojn (Malgraŭ ke la kredonivelo rilatas kun la lerna nivelo, kiel ni vidos poste ) sed la lerna nivelo direktas la elekton al postuladoj aŭ faktoj ŝajnantaj pli akordigebla kun ĉi tiu nivelo, pli " raciaj ".

Ekzemple, en la kazo de la radiestezo, la pendolo " simbolo de ĉi tiu parascienco " povos servi al persono por aŭguri, por estonton " antaŭvidi " per ludkartoj aŭ ĉia alia aŭgurilo; sed, por persono kies lernonivelo estos pli alta, ĉi tiu pendolo intervenos prefere por la detektado de la enteraj fontoj de la " geobiologio " aŭ por la detektado de la magnetaj variaĵoj de la " fontologio " tiom kara al profesoro Yves Rocard.

La deliro samas ambaŭkaze, sed ĝi aspektas pli ŝika kaj pli bone adaptita je la studnivelo en la kazo de la " fontologio ". La elekto estas pli " racia " kiam oni ekserĉas klarigojn, oni malfacile akceptas la flankon "nerealan " de la hazardo aŭ nerealan de la aŭgurado. Oni serĉadas do " sciencajn klarigojn " kaj la magnetaj fluaĵoj de la fontoserĉistoj, pretende tute konkretaj, alvenas oportune...

**LA PLIALTIĜO DE L'OKULTISMO**

En la lando de Condorcet (Kondorse), la kredoj disfloriĝas kaj la ekzameno de la situacio estas zorgiga[15]. Plurfoje mi kaptis okazon por skribi kaj mi rememoros ĉi tie kelkajn donitaĵojn.

15. Henri Broch, Au cœur de l'Extra-ordinaire, coll. " Zététique ", Ed. Chimérique, Bordeaux, 1994.

Ĉi tiu tablulo resumas enketon kiun mi faris antaŭ preskaŭ dudek jaroj pri la respektivaj kredoj kiujn la studentoj de la unua ciklo scienca havis rilate al psikokinezo (tordado de la metaloj de la mensa povo, tre laŭmoda tiam kun la sinĝoro Uri Geller) kaj rilate al la rilativista dilatado de la tempo. Enketoj naciskalaj konfirmis ke ĉi tiuj malĝojigaj konstatoj kiuĝ supozeble povus esti ekzemploj apartigotaj pro loka kunteksto aŭ pro formulado dubosenca de la metitaj demandoj.

Enketo en la studantaro de Unua ciklo de sciencoj
Université de Nice. Deug A1, Blet A2. 1982-83


| Psichokinezo/Rilativisteco | " Tordado de kuleroy de la mensa povo" | "Dilatiĝo rilativista de la tempo " % |
|---|---|---|
| Pruvita science, akiraĵo scienca ? | 68 | 18 |
| Agnoskita kiel akceptebla, ebla ? | 14 | 18 |
| Malmulte ebla ? | 15 | 7 |
| Pura spekulaĵo teoria ? | O | 52 |
| Tute malsankciigita ? | 3 | 5 |

© H.Broch

La tri skemoj sekvantaj baziĝas sur laboroj eldonitaj de du sociologoj koncerne la francan enloĝantaro[16].

16. Daniel Boy & Guy Michelat, " Croyances aux parasciences. Dimensions sociales et culturelles ", Revue française cie sociologie, XXVII, 1986, p. 175-204.

La nivelo de kredo malaltiĝas kun la aĝo laŭ maniero tute senalta kaj, fakto onidirata de longe estas klare konfirmita rilate al astrologio. Male al kio oni povis supozi; unuavide, la grado de kredo al la paranormalo estas rekte proporcia je la nivelo de la studoj faritaj, kun malgranda ekcepto por la scienca supero... kies grado de kredo al paranormalo restas tamen supera kompare kun la meznombro !




Pri la nivelo de la kredo rilate al la soci-profesiaj kategorioj, la rezultoj estas tiom grande surprizigaj. La enketistoj notis eĉ ke " la instruistoj estas pivota grupo ĉar ili difiniĝas kiel la grupo kiu kredas la plej ofte al astrologio kaj al paranormo ". La fakinstruistoj, kvankam havante nivelon de kredo al l' astrologio " malforta " ( ĉirkaŭ...30% tamen !), havas nivelon de kredo al paranormo supera je la meznombro.


Konklude: la eduka medio kaj ties aktoraro ( instruistoj, fakinstruistoj, profesoroj, studentoj ) estas aparte karakterizata de sia alta nivelo de kredo al paranormo.
La donitaĵoj prezentitaj en 1993 dum la kolokvo " La scienca penso, la citizanoj kaj la parasciencoj " montras pligraviĝon de la antaŭaj konstataĵoj. Pli ol unu Franco el du kredas al la telepatio kaj unu el dek al fantomoj , la instruanta medio ne ekceptas la regulon. Oni povus suspire kvietiĝi eksciante per aliaj donitaĵoj ke 81% de la francoj pensas ke " la disvolviĝo de la scienco kuntiras la progreson de la homaro ". Sed la entuziasmo mallonge daŭros kiam oni malkovras ke, samtempe, 58% de ĉi tiuj samaj Francoj pensas ke " l'astrologio estas scienco ". Tio kio evidente devigas nin rigardi ege prudente la unuan respondon kies vera entenaĵo estas aparte malgravigita…

**La Francoy, la scienca penso kay la para-sciencoy**
SOFRES. Cité des Sciences, Le Monde, Fondation EDF. 1993

| | % | | |
|---|---|---|---|
| Kredo ? | Yes | Ne | Sen opinio |
| Resanigo per magnetigisto, surmetado de la manoy | 55 | 40 | 5 |
| Transendo de penso | 55 | 42 | 3 |
| Klarigado de la karakteroy per la astrologiay signoy | 46 | 49 | 5 |
| Sonjoy kiuy auguras la estonton | 35 | 62 | 3 |
| Antaudiroy per la astrologiay signoy, horoskopoy | 29 | 68 | 3 |
| Antaudiroy de auguristinoy | 24 | 72 | 4 |
| Enskribazhoy de la destino en la linioy de la mano | 23 | 72 | 5 |
| Envultoy, sorchazhoy | 19 | 79 | 2 |
| Pasadoy sur Tero de eksterteranoy | 18 | 77 | 5 |
| Turnantay tabloy | 16 | 81 | 3 |
| Fantomoy, revenantoy | 11 | 87 | 2 |

©H. Broch

**AKV- O -KULTA FALO & CETERA...**
***( la ludvorto bazita sur homonimeco inter "eau culte" kaj "oculte"***
***de la originala titolo de ĉi tiu paragrafo ne estas tradukebla )***




Se la kredoj plene prosperas, necesas ekkonscii ke la fenomenoj sur kiuj estas bazitaj ĉi tiuj kredoj ne kreskas , nek nombre, nek grade.Male eĉ, la korpuso mallaĝiĝas rapide. Mulobligado de panoj, sorĉistinoj sur balailo kaj tibeta lamaso levitacianta maloftiĝas pli kaj pli... Kaj la intenseco de la fenomenoj malaltiĝas ankaŭ.


**Ekzemple, jen la variado de la " potenco " de la resaniĝo de la akvo de Lourdes ( Lurd') funkcie**

**de la tempo**[17]**.**

La falo (kiu neniel maligas la pligrandiĝon de la nombre de la pilgrimantoj) estas sufiĉe klara. Ĉi tiu variado ne estas limigita je ĉi tiu nura maria loko. Oni povas eĉ ĝeneraligi ĉi tiun malpliiĝon al ĉiu fenomeno " paranorma ", kiel tion montras la ekzameno de la povo de psikokinezo ( la fama povo de translokigo de la aĵoj de malproksime per la nura koncentriĝo de la menso ) funkcie de la tempo.

**17.**Thérèse & Guy Valot, *Lourdes et l'illusion,*Maloine, 1957.

La " mana " suposeble translokigis antaŭ pluraj jarcentoj la statuojn de la Paska insulo (plurajn tunojn pezantaj ). Dum la jaroj 1850, ĉi tiu samapovo arogis al si la movon de pezaj tabloj ( unu kilogramocento ). Kelkaj jardekoj malfrue, oni zorgas pri kaseroloj ( unu kilogramo ). Dum la jaroj 1970, oni reduktas la eblan translokigon de etaj objektoj, kiel peco de ŝakludo. Je la nuna horo, ĉi tiu sama povo permesus, al mediumo koncentriĝante tre ege fortege, translokigi...ege etan paperan peceton ( unu gramo ) ! La fenomeno PK falis do " evidente paralele je la pliperfektiĝo de la kontrolaj rimedoj " per faktoro de pli ol unu miliono laŭlonge de la tempo.




### LA KIALOY DE LA " PARADOKSO "

La ŝajna paradokso kiun starigas la kunmetado-komparado de la forta kreskado de la kredoj al paranormo kun la malpliiĝo de la nombro de la fenomenoj kaj de iliaj intenseco povas esti klarigitaj sufiĉe simple.

### RESONSKATOLO DE LA "ELEKTRONAJ" INFORMRIMEDOJ

La korpuso de la fenomenoj paranormaj ricevas fakte helpon kaj subtenon de ĉi tiu resonskatolon sen samvaloraĵo dum la pasintaj generacioj[18]. Dum en la komenco de la jarcento, vilaĝa spritulo famintus nur mallarĝe loke, sufiĉis ke senpretendemeca poltergeist taŭzis belgan vilaĝeton por ke CNN tutmondigis la informon.

18.Pensu je la aŭdantaro grandeco de la televida ĵurnalo " France 2", la 1an de januaro 2000 !

### DEONTOLOGIA DRIVADO DE LA ĴUNALISTA MEDIO

Sufiĉas sonĝi al mensogoj karakterigitaj dissenditaj de iaj elsendoj dediĉitaj (aŭ ne) al " paranormalo " kaj al la deontologia drivado de ĵurnalistoj kiuj ne hezitas oferti la veron sur la aŭskult-sukcesa; " kaĝ financ-fruktodona " altaro. Sen paroli pri la stulteco de iuj " riskante pezan insiston, mi rememoras la televidan ĵurnalon inaŭguran de France 2. Ne, la informrimedoj " La ĝeneraligo estas troeca kaj la koncepto malrespondeciga, necesas aŭdi ĉi tie " tre multe da informrimedoj trans la produktistojn kaj la ĵurnalistoj kiuj faras ilian entenaĵon " ne estas (la) Prometeo(j) esperitaj de iliaj kreintoj. Ili ne donas plue al la leg-aŭd-vid-antoj tion kion ĉi tiuj lastaj atendas ili ne estas la " tradukistoj ", la "perantoj", la " mediumoj " (!) de postulo. Ili kreas ĉi tiun peton kaj sajnas simple poste respondi al ĝi. Ili ne estas neŭtralaj sed male ili plialtigas la fenomenoj de returniĝo al la religieco " kaj al la akompananta senvaloraĵo . " En ĉi tiu senco, kvankam ili ŝajnas funkcii kiel termometro kiu registras temperaturan altiĝon,male la informrimedoj apartenas al la brulaĵo kiu satigas la varmigilon[19] . Ĉi tiu priskribo plaĉeblas, sed ĝi malfeliĉe falsas. Brulaĵo brulante malaperas en la bruligujo. Tio kio ne estas, vi konsentos, la kazo de la informrimedoj. Ĉi tiuj rolas pli kiel

varmigistoj kiuj nutras per brulaĵo la brulmaŝinon.

19. Umberto Fco, La *Guerre du faux,* Grasset, 1985.

**TRANSMISIRIMENO DE LA... EDUKA MEDIO !**

Male al tio kion oni supozeblus unuavide kaj konfirmante la kredonivelojn funkcie de la socioprofesiaj kategorioj, la eduka medio iĝas..., la transmisirimeno de la kredoj. Tiel dum tri jaroj, ĝis 1994-1995, kvar klasoj nivelo 6e ( unua grado) de ŝtata kolegio en suda Francio estis formitaj ( kun la konsento de la tuta " pedagogia " taĉmento ) klasifikante la lernantojn laŭ kriterioj... astrologiaj ! Kaj ĉi tiu " astropedagogio " ne estas epifenomeno[20].

20. Henri Broch, " Les phénomènes paranormaux..." , op. cit.

**ANSTATAŬADO RACIO > SENTO**

Ni vivas nune apartan fazon de modifo de la procezoj de akirado de la konoj. La disgrandiĝo de la informado estas precipe, se ne nur, karakterizata de la pufiĝo de la vida bildo kaj de la tuja sento je la malprofito de la skriba simbolo kaj de la subtenata analizo.

Rolante kiel komunikrimedo, la skribo permesas detalan analizon, konstruita, kritika kaj uzebla dum komforta tempodaŭro, dum la nunaj informrimedoj grandiĝatan lokon donas al kurtmomenta bildo kaj al la stimulreagoj kiujn ĝi elklikigas. Ĉi tiu anstataŭiĝo de la paro " skribsimbolo + subtenata analizo " per la paro " vidbildo + tuja sento ", ĉi tiu po-ioma kaj mallojala anstataŭiĝo de la racio per la sento indus esti plene studata, trans la nuran konsekvencon pro kio mi ĝin elvokas ĉi tie, tio estas la kunformigon de pensotipo kiu substreĉas la kredojn.

**INTESTO AU ENCEFALO ? THAT'S THE QUESTION** (Yen la demando)

La scienco kaj la kulturo lokiĝas je la centro de la moderna homo. Jen kial, trans la malfacilaĵojn kiuj povas ekzisti, sciencisto, civitano respondeca en la socio en kiu li vivas, povas kaj devas starigi la problemoj kreitaj de la disvolvado de la pseŭdsciencoj kaj de la kredoj.
Tiom gravas pli ke tio okazu pro la fakto ke la scienco estas prodifine tio kio ĝenas la dogmemulojn.La rolo de civitano de la sciencisto prenas do apartan senson kaj etendiĝas trans la simplan sferon de la " paranormalo " kaj lia agado en la respublica, esence eĉ politika, povas helpi al evidentigi ke kredo kaj paranormalo estas intrinseke oponantaj al la homo.
Efektive, sur ĉi tiu " kampo " kelkaj demandoj stariĝas :

- Ĉu la destino de l'obĝekto-homo, sen libera decidpovo, estas enskribita en la arabeskoj de la planedoj, en la koro de la steloj ?

- Ĉu la eksterteranoj venis sur Tero por eduki la homo-primatuloĝn ne kapablaĝn pri memevoluado?

- Ĉu oni lasos sin redukti de la magiaj kuracartoj en trunkohomo ? Ĉu oni vere bezonas fidi la specifikan kuracan povon de malplenaj granuloj aŭ de plezurigaj nadloj ? Ĉu oni neos la ŝokon de la homo mem ene de lia korpo ?

- Ĉu superhoma povo, montras sin pere elektitaj ( de kiu ?) individuoj kiuj estas la mediumoj kiu " ilia nomo tion indikas " estas nur perantoj ?

- Ĉu estas ento kiu transcendas la homo kaj konsentas manifesti sin tra mirakloj ? La vasalhomo, obeema subjekto, ĉu li estas kondamnita preni siajn leĝojn, siajn komandojn, siajn ordonojn ĉe la koro de la supernaturo ?

Male al la formo de siaj asertoj, la plej multe de la astrologoj, pseŭdomedicinistoj, paraspikologoj kaj teologoj respondas fine, pri la fundo, al la demandoj kiuj antaŭas per diro klare jesa.Ĉiuj la " solvoj " kiujn ili proponas tiel estas nur reale solvoj de facileco kiuj starigas kiel unuan bazon la neadaptiĝon de la homo al kompreno de la universo kiu ĉirkaŭas lin. Kvankam estus pli simple substreki ke investi sin kun la intestoj ne malpermesu nin laborigeti la encefalon. Kaj ke' al la diversaj demandoj kiuj povas sin prezenti, necesas ellabori responderojn iom pli trafaj ol la veraj insultoj al la homa inteligentecokiuj estas la arogaj eldiroj de la psiemuloj kaj aliaj kredantoj. Ĉi tiun neadon de la homo evidentigas la sekta tekniko kiu konsistas en la senpersonigo de la individuo. Tekniko povante preni diversajn aspektojn ( inkluzive tiun de... doni " iun " personecon al la individuo ) sed restante fakte, fundamente, ĉiam la sama. Sensaj senigoj , fiziologiaj senigoj, informada senigo, solecigo, meditado, ktp... De la marines US ( aŭ la similaj francaj kiu ne revenas rekte al mia menso ) al la hindaj aŝramoj preterpasante la Trapistoj and Co, ne evidentas vidi kie lokiĝas la fundamenta malsimileco. Se tamen malsimileco estus. Fakte, eĉ se la pasado de Sro Alfred Duparc al " matrikulo 30-42-7824 " aŭ al " Suno de la mateno " aŭ al " Frato Gennaro ", la tekniko de pasado/ senpersonigo konstantas. Tiel, male je la tro ofte " realaĵo " afiŝata en la plej multaj informrimedoj kolportante mirindaĵojn pri la religioj, kredoj kaj pseŭdosciencoj, ĉi tiuj lastaj estas nur la parton elmergataj de pensomodo kies bazo, male de la asertoj subtenataj, estas la preciza negacio de la nocio de individuo.

La leitmotivo estas ke " fortoj " povas esti valorigitaj de iuj individuoj ( la " elektitaj ", la " mesioj ", la " surperdotitaj " la aliaj etante nur servistetaro valorante nur por aŭskulti...) kiuj tamen ne estas la " nakantoj " de ĉi tiuj fotoj, de ĉi tiuj povoj, sed nur la " fokusumantoj ", la " pastroj ", la " mediumoj ".

Oni tiel ĉeestas mistifikadon de la kono kiu havas kiel rezulton koncepton de la mondo en kiu multaj elementoj restas neeviteble ekster la kampo de komprenebleco " do de kontrolo " de la plej multo de la individuoj. Ĉi tiu misformado de la pensmaniero indukas fine distavoligon de la mondo, ĉi tiuj kiuj havas " povojn ", scias kaj agas kaj, malproksime sube, ĉi tiuj kiuj miras, rigardas kaj sekvas sen kompreni, elirante al gapanta fatalismo kaj al la senrespondecigo de la individuo.

Sen forgesi ke la scienca sinteno kaj la civita konduto[21]necesigas la saman humteron moral-mensan specifan por sian disvolviĝo. Kaj socio vere demokrata antaŭsupozas necese civitanojn kapablajn al pripensado. Jen kial gravus ankoraŭ pli ol oni pensas ĝenerale se disfalus la bazoj de la kritiksprito.

Male al tio kion pensas multaj sciensistoj aŭ filozofoj, kiuj rifuzas dediĉi ioton da tempo el sia tempo al la " sen-sensaĵoj paranormalaj ", ĉi tiuj informrimedaj steluloj ne estas rubujoj sendanĝeraj aŭ recikligeblaj, propraj al la kunsumado de la plej multnombra. Ili estas veraj intelektaj virusoj kapablantaj infekti iun ajn, sciencistojn entenatajn, kaj la epidemio povas atingi larĝecon ne suspekteblan ĝis kiam la kulturo kaj societo malfortigitaj, perdas siajn imundefendajn reagojn, la nomo " intelekta aideso " estus ĉi tie etimologie perfekte adaptita, kaj sin turnas fronte al la scienco, sola vera motoro de homara progreso.

En nia socio serĉadanta intelektajn elturniĝojn, rekompensojn reduktatajn je la nura nivelo de la imago kaj facilajn vertiĝojn, malfruas multe pli ol kredas oni. Jen aldoniĝanta kialo por rekomendi "urbi et orbi" la disvolviĝon de la racio.

21.Se mi skribas " citoyen "(civitano), ies brovoj povas kuntiriĝi se ili rememoras kelkajn liniojn de Jean-Claude Michéa, " L'Ecole du Capitalisme total", en la n$^{o}$22 de la revuo Agone...

**KONKLUDO ?**

Kompreneble, " l' antaŭgardo kaj l' edukado al la juĝkapablo restas sendube la rimedoj la plej efikaj por lukti kontraŭ la grupoj [. . .] kiuj manipulas la iesajn homarajn kaj spiritajn dezirojn [...kaj], trans la necesan atentemecon de la ŝtatoj, la plej bona respondo al la demando [de la sektoj] restas verŝajne la kritikkapablo de la individuoj " [22]

<u>Sed necesas ankaŭ ke la kritikkapablo :</u>

1e ekzistu ;

2e havu bazon sur kio ekzerci sin.

Kritikkapablo ( sub la evidenta antaŭgardo ke ĝi ekzistas aŭ estas formata ) funkcios vakuen se ĝi ne estas sufiĉe informita kaj informita sufiĉe objektive.

<u>De tie la reiro al la problemo :</u>

1e eduksistema ;

2e informrimeda.

Sen la informo, la utileco de la kritikkapablo estas necese limigata ( limigado kiun multaj grupoj serĉadas ). Rilate al la formado " unua neceseco ", ĝi estas eble malfacile certigata kiam oni ekkonscias ke la ĵurnalista medio, de la laŭdirataj intelektuloj kaj de la instruantoj konsistigas kvazaŭ tute... la naskbredujon de la kredoj ! Noam Ĉomskj skribas pri la ĵurnalistoj ke " ili kreis bildon de stulta amaso kiu estu estrata de inteligentaj intelektuloj. Fakte, tio kion ni multfoje malkovris, estas ke la intelektuloj, ĉi tiuj edukitaj klasoj, konsistigas la plej doktrinigitan parton, la plej nesciantan, la plej stultan de la enloĝantaro ".[23]

22. Frédéric Lenoir, " Controverses à propos des sectes ", Manières de Voir (Le Monde diplomatique), n0 48, novembre-décembre 1999, p.79-81.
23. Noam Chomsky, texte de 1987 cité par Gérard de Selys dans sa conclusion à l'ouvrage collectif Médiamensonges, éd. EPO, Bruxelles, 1991.

Ne kredu ke la malkovro estas la rezulto nur de la fakto ke ĉi tiu lingvisto enketis ĉe la neoprimatuloj intektaj de la Nova-Mondo kies kulturaj radikoj estas kurtaj kaj malliberalaj ( laŭ la proksimuma vido de iuj el de la lando de Descartes). En nia bela malnova Franclando, toĉo de la mondo, mi memorigas al vi ke siciologistaj laboroj montris al ni ke la kredo al paranormalaj fenomenoj plialtiĝas kun la kultura " nivelo "! Kaj ke stulteco de iuj televidaj ĵurnaloj limojn ne havas.

Intelektulo estas persono kies profesio entenas precipe mensan aktivecon. Ja, sed ĉi tio neniel implicas ke ĉi tiu aktiveco estu inteligenta. Ĝenerale, fronte al la kredoj, fronte al ĉi tiu sensoperdo (kritika, evidente), kion oni povas fari konkrete ? Mi resendas vin, Leganto, al kuracilo kiu aparte plaĉas al mi: la disvolviĝo de la zetetiko[24].

kaj por fini per optimista noto, mi volus diri ke ne ĉiu espero estas perdita ĉar, ie en perdita ejeto de la encefalo, pastroj kaj fideluloj konservas racieron kiu instigas ilin al akcepto de la helpo de la scienco kaj de ĝiaj aplikadoj kiel rememoris plaĉe al ni, jam antaŭ preskaŭ du jarcentoj, la naturalisto Liĉtenberg: " la predikadoj en la preĝejoj ne malutiligas iliajn fulmoŝirmilojn ".Sed la skizita rideto ne forgesigu al ni, ke kiam oni parolas pri religioj, sektoj, ideologioj, " paralelaj " scioj kaj aliaj mirindaĵoj, se ili ne similas laŭforme, la prizonoj de la menso identas tamen laŭfunde.

HENRI BROCH
Profesoro pri fiziko & pri Zetetiko en la Universitato de Nice-Sophia Antipolis
Informado (en la franca) pri la laboratorio de la Universitato de Nice-Sophia Antipolis
http ://www.unice.fr/zetetique

24. Henri Broch, " Les phénomènes paranormaux.., au secours de la culture scientifique ", Bulletin de la Société Royale des Sciences, Liège, Belgique, vol. 67, 1998, p. 235-253 ; "

Teaching " Paranormal versus Zetetics at the University ", in Actes du European Skeptics Tenth Congress (16-20 septembre 1999, Maastricht, Pays-Bas), sous presse. ( varianto mallongigita estas same presata en la revuo de CSICOP américain " Save Our Science. The struggle for reason at the University ", Skeptical Inquirer).

**Fino de l'artikolo**

Ĉi tiu traduko de la artikolo estas eldonita de la esperantista revuo **"La Gazeto"**